



## La unuaj tridek tagoj

Al:  
sekcioj kaj komitatoj de ILEI

Informe al: la grupoj 'e-ins' (yahoo), 'uea-membroj', 'komitatoj-de-uea' partneroj kaj kunlaborantoj.

Karaj!

Jen rapida mesaĝo por certigi al vi, ke la nova estraro de ILEI forte laboras por difini siajn fakojn kaj eklabori. Aperis en nia retejo la konsisto kaj taskdivido de la nova estraro – biografioj sekvos. Vidu ĉe: <http://www.ilei.info/instancoj/estraro.php>

### Konferenco Kunminga:

Ĉio arigebla videblas ĉe: <http://www.ilei.info/agado/konferencoj.php>. Supre unu el la miloj da faritaj grupfotoj. Pli da fotoj kaj impres-tekstoj ĉiam bonvenas. Ĉefe ni serĉas fotojn kun preskvalito (min. 300 dpi). Helpu al ni inde prezenti nian memorindan konferencon en la tuj fermota numero de *Internacia Pedagogia Revuo* (IPR).



### Novaj Sekcioj

Aperas en nia retejo novaj sekcioj ĉe <http://www.ilei.info/instancoj/sekcioj.php> – Nepalo, Mongolio kaj Vjetnamio, plie nova reprezentanto en Pakistano. Sur la foto la prezidanto renkontiĝas kun vjetnamaj pioniroj kaj aktivuloj dum la UK en Hanojo.

En lastatempa renkontiĝo, ni diskutis la potencialon por sekcio en Indonezio.

Ni nun laboras, por ke tiuj novaj sekcioj nomumu siajn komitatojn. La aliĝpetilo por novaj sekcioj estas bonigita, surbaze de la spertoj akiri tiujn tri novajn sekciojn; post pristudo, tio aperos en la retejo.

### Eventoj kaj estrarkunsido

Ni planas partoprenon de ILEI en la nacia simpozio en Rumanio, kiu okazos apud Cluj en la 5a-7a de oktobro. Pri la regiono: [http://ro.wikipedia.org/wiki/Castelul\\_B%C3%A1nffy\\_de\\_la\\_Bon%C8%9Bida](http://ro.wikipedia.org/wiki/Castelul_B%C3%A1nffy_de_la_Bon%C8%9Bida) Partopren-anonco iru al: [mariana.berariu@gmail.com](mailto:mariana.berariu@gmail.com). La temo estos 'Esperanto kaj la edukado.'

Ni estas nun findecidantaj pri nia unua estrarkunsido. Tio okazos meze de novembro en Modra-Harmonia, Slovakio, antaŭ aŭ post KAEST (Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko): <http://kaest.ikso.net/>, la jara renkontiĝo de sciencistoj kaj komputistoj, kies ĉeftemo estas 'Modernaj edukaj metodoj kaj teknologioj'.



Plie okazos kunsido de ALTE (Asocio de Lingvo-Testantoj en Eŭropo) en Munkeno (sept 21-23), kie reprezentiĝos ILEI: anglalingve: [http://www.alte.org/news\\_posts/view/17](http://www.alte.org/news_posts/view/17)

La jara kunsido de nia germana sekcio, TORPEDO-8 okazos en Herzberg de la 29a de septembro ĝis la 3a de oktobro. <http://agei.esperanto-urbo.de/page.php?pid=80878295>.

ILEI nun havas estraranon pri kompilo de eduka kalendaro, kiu akceptos ĉiajn informojn pri sekciaj aŭ aliaj instru-rilataj eventoj.

### **Komitata voĉdono**

Finiĝos la kvara komitata voĉdono de la jaro en la 31a de aŭgusto, 2012. Alvenis malmultaj voĉoj, do ni FORTE ALVOKAS al komitatanoj NUN reagi al la mesaĝo de la 10a de aŭgusto (temlinio VDON-KOM) kaj esprimu voĉon. Per tiu voĉdono oni aprobas la protokolojn 2 kaj 3 el Kunmingo, kaj akceptos la starigon de nova membro-kategorio C. La estraro nun studas ampleksan landoliston (kun pli ol 180 landoj), kiu fiksas la landojn, kiuj apartenos al la nova kategorio. Tuj kiam eble, tiu listo estos konigita al sekcioj kaj komitatanoj, kiuj poste en la jaro havos okazon voĉdoni pri ĝi.

### **Eldonaĵoj**

La devoj tumultas kaj urĝas. Tujunue, pri IPR3: la redaktoro kaj la estraranoj, kiuj ĉeestis en Kunmingo intense laboras fermi la numeron. Tuj poste venos al la vico *Juna amiko* 2, kiu neeviteble malfruos. Tuj poste gravas nova varbilo por 2013 kun prezento de la nova estraro, ĉar tio devos disiri kun JA2 (kaj poste kun IPR4). Ne venis vicofino: la simpozia kajero el Kunmingo gravas. Ni arigis 80 paĝojn da materialo kaj serĉas fortojn por la teknika pretigo. La nova estraro klopodadas akiri la neniam aperintan materialon el la simpozio el Kopenhago, por transpreni la taskon aperigi tion. Klare, sur la kampo de eldonado, ILEI estas kritike kaj despere sen sufiĉe da laborfortoj kaj rimedoj.



**Se ĉio alia paneis – konsultu la gvidlibron!**

### **Transdonoj kaj kontinueco**

Kritika tasko en la nova estraro estas la glata transigo de ŝlosilaj funkcioj al novuloj. La sekretariaj taskoj transiros relative glate, ĉar la nova sekretario havas jam grandan sperton. Ĉe la financaj aferoj la transigo pli defias; urĝas krei gvidilon pri la uzado de nia komputila librotena programaro. La membro-administrado simile transiros; la ekzistantaj gvidiloj bezonas ampleksigon. Sed gvidiloj povas helpi nur iomgrade – nenio povas anstataŭigi la bezonon por la malnova kaj nova agantoj intense kaj longe komuniki – laŭeble dum personaj renkontiĝoj.

### **Planado:**

Estraranoj ricevis provon skizi laŭmonatan gvidilon, kiu listigas ĉiujn konstantajn devojn kaj limdatojn tra tipa jaro en ILEI. Tio formas la bazon por preskaŭ finverkita pli specifa laŭmonata plano por aŭgusto-decembro 2012. Post estrara aprobo, ambaŭ dokumentoj estos publikigitaj. Tiuj gvidiloj formas parton de niaj klopodoj faciligi estontan trejnadon de novaj estraranoj.

Ne forgesu, ILEI havas multajn taskojn sen plenumantoj. Komisionoj devas ekagi pli forte, sekcioj devas pli aktive kontribui al nia internacia laboro. Nur tiel, antaŭen!

Stefan MacGill, prezidanto

La 23an de aŭgusto, 2012